

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2022

Jarkolekto 9 Numero 1



ENHAVOTABELO

de januaro 2022

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5
<i>Kvara Universala Kongreso Dresdeno 1908</i>	
<i>20a kongreso de SAT 1947</i>	
<i>Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1928-1910)</i>	
<i>Centjara jubileo de Esperanto 1887-1987 Pollando</i>	
Spikumajoj & suplementoj: 1911-jaraj prezoj en spesmilo!	14
Esperantaj stampolamenoj: Stampolameno de ILEF	15
Aspektoj de numismatiko: Monaj kaj monecaj ornamaĵoj	16
Historiaj aspektoj: La ekua kiel pramonunuoj de la Eŭropa Unio	19
Por spuremuloj!	22
Terminaro: Alfabeto listo (28)	23
Medalistoj: 28. Judit Gyeney (°1942)	24
Numismatika Forumo: Kriptomono Esperanto (2)	26
El la gazetaro: Esperanto-monoj kaj esperantaj monNomoj	29
Retpoŝto	31
Anoncoj & eventoj	43

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

“...interesa kompilo, kiu plivervigas eĉ korojn ne-numismatajn!”

Jozefo Horvath, koncerne la kvaran numeron de la oka jarkolekto

Okaze de la jarŝanĝo decas kaj plaĉas danki ĉiujn, kiuj kontribuis iamaniere al la kompilado de la postaj kvar numeroj, entute preskaŭ 160 paĝojn riĉaj.

Tamen, unuavice la redakcio volas danki membrojn kaj aliajn legantojn kiuj, post ricevo de la ENA-bondeziroj por 2022, afable aŭ danke reciproke bondeziris.

Parenteze, jen afabla kaj necesa peto al kelkaj el niaj membroj. Ni regule konstatas, ke la komputila “akceptujo” de diversaj retadresoj estas tute plena, tiel ke novaj numeroj de nia revuo returniĝas al Belgio. Por eviti tion, ni petas, se eble, antaŭvidi la sendon de la revuo en la dua parto de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Antaŭdankon!

Sekve kaj fine ni volas tutkore danki ĉiujn membrojn kaj ne-membrojn (eĉ ne-esperantistojn!), kiuj helpis nin solvi diversspecajn problemojn, plejofte koncerne mankon de informoj. Ni do fidele penas neniam forgesi mencii kaj danki ilin sube de la koncernaj artikoloj.

Malgraŭ la maratona pandemio kaj la sekvoj de tiu interhoma katastrofo rilate al en- kaj eksterlandaj rilatoj, nia membrokvanto lante sed senĉese kresketas, tiel ke ENA povis gaje bonvenigi ĉi-jare **la 150an individuan membron-abonanton**. Temas pri pola sinjorino el la naskiĝurbo de Zamenhof, kiu estas kunlaborantino de la loka Esperanto-biblioteko, unu el la diversaj asocioj, kiu fidele konservas por la estonceco la revuan heredaĵon de ENA kaj disponigas ĝin daŭre al ĉiu, kiu volas studi aŭ scivole elŝuti artikolojn.


Ankaŭla **nombro de asocioj kreskis ĝis 24** dank’al la aliĝo de pakistana kaj de belga asocioj; do 24 el 17 landoj. Aktuale 150 individuaj membroj kaj nekonata nombro da asocioj ne plu miras, ke Esperantujo havas proprajn numismatikaĵojn kaj propran numismatikan fakgrupon!

Ĉi-jare ni – vivonte kaj bonfartonte – intencas eldoni la naŭan jarkolekton de nia revuo. Kreskis kaj kreskadas la nombro de priskribitaj medaloj kaj moneroj, kompilindaj kaj certe kompilendaj por eldoni **la unuan numismatikan “katalogon”**, ilustratan aŭ ne, enciklopedian aŭ ne. Do endas kune pripensadi kaj ekorganizi. Samtempe ankaŭ kreskadas la vortrezoro de esperantaj numismatikaj terminoj por, post 135 jaroj, fine povi kompili la unuan numismatikan **“Terminaro de Esperanta Numismatiko”**. Do, viaj proponoj, ideoj kaj sugestoj koncerne la strategion por organizi kaj realigi tiujn projektojn, estus ege bonvenaj, ĉar por ni tiu intenco aktuale aspektas kiel salto en nigran abismon, kvankam malrapide koncepto de strategio en la kapo ekmaturiĝas.

Sur la sekvonta paĝo vi trovos superrigardon de la “membraj landoj” (44!) kaj la kvanto de membroj. Mankas ankoraŭ tro multe da landoj. Ni daŭrigu la varbadon, por ke kreskadu ENA!


Bert

Sinoptika bilanco 2021




“ENA-landoj” kaj laŭlandaj nombroj de individuaj membroj fine de 2021

(La oficiala nomo de Makedonio estas Nord-Makedonio!)



Laŭjarakreskado de individuaj membroj dum lapasantaj jaroj (2012: +2; > 2021: + 5)



Laŭlandaj nombroj de asociaj membroj, kiel universitatoj, bibliotekoj, muzeoj kaj diversaj (ne)esperantaj asocioj

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Kvara Universala Kongreso Dreseno 1908



Lando: Germanio
Metalo: bronz(it)a
Jaro: 1908
Mezuroj: 38 x 31mm
17 x 12 mm

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 6,58 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 1 mm

Averso: (*unuflanka medalo*)

supre meze: krono kun verda emajla steleto

supre, ambaŭflanken kaj suben: ornamaj plektogalonoj

supre, sub la steleto: “16-22. 8.1908”

meze: “DRESDEN” + nigra emajla silueto de la tiama urbo

flanke kaj sube: “IV.INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO”



Rimarko 1:

por la kvara Kongreso estis uzita la adjektivo “INTERNACIA”, anstataŭ “UNIVERSALA”.

Rimarko 2:

Reverse estas aldone fiksita fibolo i.a. uzita surverse, kiel sur la foto de Zamenhof.

Ankaŭ du pinĉfiksiletoj por ŝnureto, de kiu pendas la urba blazono de Dreseno.



Rimarko 3:

La medalo mem estis stampita brakteate.

Rimarko 4:



Jen ekzemplero kun rubandeto. Eble la blazoneto estis forprenita aŭ kaŝita post la medalo.

Rimarko 5:

Medaloj kaj eĉ pingloj kun aldonita blazono k.a. estas vere tre raraj.

Rimarko 6:



glumarko



afiŝo

D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

20a kongreso de SAT 1947



Lando: Danio (Jutlando)

Metalo: kupro-nikelo

Diametro: 30 mm

Jaro: 1947

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 2,75 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

Averso: (*unuflanka medalo*)

en ĉirkaŭa duobla rando: “XX KONGRESODE S.A.T. 1947”

meze supre: en la supra duono de cirklo bildo de konstruaĵaro kun nuboj kaj fono de horizontalaj strioj

inter la duonoj de la cirklo: “AARHUS” (dania urbo)

meze sube: en la suba duono de la cirklo: bildo de esperanto-steleto

Rimarko 1:

reverse aldone fiksita fibolo.

Rimarko 2:

la 20a kongreso en Aarhus estis la unua postmilita kongreso de S.A.T. Ĝin partoprenis 662 homoj el 9 landoj. Survoje al la kongresloko, S.A.T.-karavanoj, trapasantaj Germanion, kunportis pakaĵojn de nutraĵoj kaj vestaĵoj por membroj en tiu lando.

Rimarko 3:

la kongreso okazis de la 2a ĝis la 7a de aŭgusto 1947.

Rimarko 4:

S.A.T.= Sennacieca Asocio Tutmonda. La asocio estis fondita dum la unua kongreso en 1921 en la urbo Prago. Ekde tiam okazis pli ol 90 jarkongresoj. Antaŭ 1940 S.A.T havis 10.000 membrojn.

Origine S.A.T. estis laborista movado. Nun ĝi pli ĝenerale celas helpi, informi kaj instrui progresemlulojn kontraŭ subpremo kaj socia maljusteco.

La asocio ne celas disvastigi Esperanton, sed uzas la internacian lingvon kiel laborlingvon. Ĝi tamen famiĝis en Esperantujo pro la eldono de “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)”.

Rimarko 5:

okaze de la kongreso ankaŭ estis eldonitaj du glumarkoj. La unua montras tre klare la averson de la medalo.





Poŝtaĵo sendita el Ŝanhajo la 14an de aŭgusto 1920, per dumvoja stacio en Egiptio la 24an de septembro 1920, al Talino/Estonio kaj tie alveninta la 9an de oktobro de la sama jaro.



Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910)



Lando: San Marino

Metalo: arĝento (Ag.835)

Diametro: 31 mm

Jaro: 1978

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 12,50 g

Medalisto: *serĉata*

Valoro: 1000 liro

Averso:

ĉirkaŭe: LEV NIKOLAJEVIĈ TOLSTOJ

1928-1978

meze: busto de Tolstoj tute maldekstren

Reverso:

ĉirkaŭe: REPUBBLICA DI SAN MARINO

meze: pejzaĝo kun la blazono de San Marino



Rimarko1:

Por nia generacio Tolstoj estas famulo de la rusa literaturo, ĉefe konata kiel aŭtoro de “Milito kaj Paco” (1865-69) kaj “Anna Karenina” (1877).

En februaro 1895, kiam la deirpunkto de Esperanto ankoraŭ troviĝis en Ruslando, la revuo “La Esperantisto” estis cenzurita pro artikolo de Lev Tolstoj, entuziasma adepto de la Internacia Lingvo. Ne nur la ruĝa diktaturo, sed ankaŭ tiuj de la tiamaj faŝistaj landoj (Germanio, Hispanio, Portugalio, Italio kaj Japanio) konsideris la zamenhofan projekton kiel danĝeran movadon, ĉu gvidatan de judoj, ĉu de komunistoj.

Rimarko2:



“La oferojn kiujn faros ĉiu homo pasiginte kelkan tempon por la studo de Esperanto estas tiom malgrandaj kaj la rezultoj kiuj povas sekvi ilin tiom grandegaj, ke oni ne eblas rifuzi al si fari tian provon”

Tolstoj

Franca versio de tiu famega kvoto de Tolstoj rilate al Esperanto:



Bibliografio:

Ulrich Lins: “La danĝera lingvo”, Bleicher Eldonejo, 1988

Tipo A3 - Esperantaj medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

Centjara jubileo de Esperanto 1887-1987 Pollando



Lando: Pollando

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo / argilo

Pezo: *serĉata*

Mezuroj: 61 x 78 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1987

Diko: *serĉata*

Averso: (*unuflanka*)

supre + sube: ESPERANTO 1887-1987

Medalista signo:



meze:

Dr. ESPERANTO
J E Z Y K
MIEDZYNARODOWY

WARSZAWA
1887

Rimarko 1:

J E Z Y K MIEDZYNARODOWY (pola): Lingvo Internacia.

Rimarko 2:

WARSZAWA (pola): Varsovio.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

1911-jaraj prezoj en spesmilo !

Nro 8. AŬGUSTO 1911. IV. Jaro.

VOĈO DE KURACISTOJ

Adreso de la redakcio kaj administracio:
D-ro Stefan Mikolajski
Lwów, Strato Śniadeckich Nro 6
Aŭstrio-Galicio.



Eliras la 1-an de ĉiu monato.
Abonprezoj jare: 2 spesmitoj 4.80
kronoj aŭstrijaj 4 markoj 5 fran-
koj — 4 ŝilingoj — 2 rubloj — 1 dolaro.

Pola Esperantisto

monata gazeto por propagando de Esperanto.

Jara abonprezo kun „Liter. Jarlibro“ rb. 2.50 (Sen 2.00). — Sen „Liter. Jarlibro“ rb. 2.00 (Sen 1.50).

Adreso: Warszawa — Varsovio (Poloj)
Redakcio — Krecza 47-A, Administracio
Hstra 20.

Dep. al komenco de januaro 1911, donu la vian jaro de sia aperado.

Germana Esperanto - Gazeto

estas ald. nita en formo de ĉiujare de vian kun rita en, orta kaj literacia enhavo kaj diversa interesaj informoj.

Sola regule aperanta esperantista semajna gazeto

la plej multaj abonprezoj, en Germanio rekte mendebla de la postoficejoj (N-ro 369 de la listo) por M. 1.25 inkluzive, eksterlanden por Sm. 3.50.

Spertimeno kontraŭ respondkuponoj.

Abonantoj ricevas siajn eldonaĵojn: La blonda Ekberto 0.20 Sm. — Hermano kaj Doroŝko de W. v. Guehe, esp. B. Küster 0.50 Sm. kun 20% da rabato.

Ĉiuj aldonaĵoj al monato al respondkuponoj por la abonanto. Nur monatoj superantaj la sumon de Sm. 2.50 (sen abonprezo) estas efektivaj abonkito.

La redakcio ricevis:

Heinrich Heine. Libro de Kantoj. (Unua serio.) Trad. d-ro L. L. Zamenhof, L. Belmont k. aliaj. Ĉe Esperanto Propaganda Instituto, Leipzig. Prezo 0-10 Sm.

D-ro L. L. Zamenhof. Kongresa Parolado en Washington. Eldonaĵo kaj prezo, kiel supre.

Ordino (Undine) de Frederiko Barono de la Motte Fouqué. El la germana originalo tradukis. K. Myslik. Ĉe: Esperanto-Buchhandlung A. Schönfeld, Wien, IX., Universitätsstrasse 8. Prezo 0-50 Sm.

Bossuet. Funebra parolado pri Louis de Bourbon, prince de Condé. El la franca lingvo tradukis Louis Bastien. Ĉe Presa Esperantista Societo, Paris, 33 rue Lacépède. Prezo 1 fr.

Saluto al Belgujo. Poezio de H. Menalda Beverter. Muziko de F. de Méné. Eldonejo: „Espero“, Prinsestraat 48, Hago (Nederlandoj).

Ostern. Vilaĝa skizoj de S. Uffers. El holanda lingvo tradukis M. J. Wessel. Eldonejo: D. van Sijn & Zoon, Rotterdam. Prezo 1-05 Sm., bindita 2-05 Sm.

Vichy. Gvidlibreto, publikigita sub la Farna Kompanio de „Vichy-Etat“.

Esperantista Kantaro. Arangita de Karl Just. Ĉe Universala Esperantia Librejo. Rue de la Bourse, 10, Genève. Prezo 1 fr.

Demandoj pri la historio, literaturo kaj organizadoj de Esperanto por esperantaj ekzamenoj. De R. de Ladevèze. Prezo 0-5 Sm. Ĉe: Friedrich Ader, Esperanto-Verlag, Dresden A.

Himno Espero. Poezio de d-ro L. L. Zamenhof. Muziko de Henri de Coppet. Prezo 1 fr. 50. Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède, Paris.

La Reĝo de la Ora Rivero aŭ La Nigraj Fratroj de John Ruskin. Prezo 0-10. Ĉe: Esperanto Verlag Müller & Borel, Berlin.

Alino. Svisa rakonto de C.-F. Ramuz. Tradukita de René de Saussure. Prezo 1 Sm. Ĉe: Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève.

ESPERANTAJ STAMPOLAMENOJ

Stampolameno de I L E F



Priskribo:

Lando: Bulgario

Diko: 2 mm

Diametro: 35 mm

Substanco: metalo

Pezo: 8,67 g

Averso: inversa bildo

- stiligita bildo de genufleksanta, filmanta persono
- I L E F
- steleto kun litero E
- ĉirkaŭe: surskribo •DUA INTERNACIA KINO-FOTO FESTIVALO•
•VRACA 10-15-X-1988•

Rimarko:

I L E F = Internacia Ligo de Esperantistaj Filmistoj (klarigo de Petar Todorov, E-veterano kaj longtempa estrarano de BEA. Li estis ĵurnalisto kaj filmisto-fotisto).



Monaj kaj monecaj ornamaĵoj dise en la mondo



Afriko: monera krono ĉe fulanaj virinoj en Burkina Faso



Azio: Reang-virino en Tripura (Hindia Unio Barato) Mez-Oriento: zona ornamaĵo de koksdancistino

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Monaj kaj monecaj ornamaĵoj

“La unuaj moneroj sur la teritorio de Ukrainio aperis en la duono de la unua jarmilo. Estis importitaj moneroj kiel romiaj dinaroj, persaj draĥmoj k.a. Plejparte tiuperiode moneroj servis nur kiel **materiale por prepari virinajn ornamaĵojn**, ne por komercaj celoj.”

Dimitrij Cibulevskij

A. Tutmonda fenomeno

Ornamaĵoj atestas pri la fundamentaj bezono kaj sopiro de la homa specio krei kaj uzi dekoraciaĵojn kaj ornamaĵojn. Tiel, tiaj artefaktoj iĝis interhomaj ne-lingvaj komunikiloj koncerne la diversajn aspektojn de la socia vivo. Ornamaĵoj do funkcias kiel esprimiloj kaj ili probable jam ekzistis antaŭ la naskiĝo de la homa lingvo kaj samlonge kiel la homa specio mem.



Margrete F. Simonsen / UiO Museum of Cultural History (kun permeso)

La universaleco de la fenomeno malhelpas trovi sufiĉe striktan kaj kompletan difinon. Jen tamen provo: monaj ornamaĵoj estas *“objektoj por ornami aŭ dekoracii korpojn aŭ vestaron, kiuj estis faritaj el (noblaj) metaloj, ligno, eburo, jado, vitro, perlamoto, aktuale ankaŭ el artefaritaj substancoj ktp”*. (La terminon *juvelo* oni kutime rezervas por ornamaĵoj pliriĉigitaj per juvelŝtonoj, perloj k.a.) Alia, pli konciza difino, el alia vidpunkto: *“Ornamaĵo estas artefakto, kompletiganta la homan korpon dekoracie kaj simbole”*.

Unu el la diversaj kategorioj estas la **mona ornamaĵo**. Ĝi estas dekoraciaĵo, en kiu unu aŭ pliaj moneroj estas kunmuntitaj. Tiajn objektojn oni (re)trovas en diversaj epokoj kaj kulturoj, dise en la mondo kaj en la historio, prezentantaj sin plejofte kiel kolierpendaĵoj, brakringoj, fingroringoj, fiboloj, butonoj, zonornaĵoj k.a.

Moneroj el diversaj metaloj estis aliformitaj, foje per simpla traborado, sekve per uzo de ŝnuro aŭ per aldono de bantoforma “okuleto”. Multvaloraj oraj aŭ arĝentaj (arĝento estis pli valora ol oro en la antikva Egiptio!) moneroj ofte estis muntataj en delikate ellaboritaj muntumoj, unuavice por “karesi” la vantecon de la komisiintaro.



Traborita romia monero



Poststampo de antikva monero de Magnentius

B. La origino de monaj kaj monecaj ornamaĵoj

Monaj ornamaĵoj estas historie valoraj kaj taŭgaj atestaĵoj de la ekonomio, politiko kaj kulturo de la antikva tempo. Tamen ili estas ofte malprave flankenmetataj, ĉar ili troviĝas sur la limo de du diversaj fakterenoj. Numismatoj konsideras ilin kiel juvelojn, por arkeologoj ili estas numismatikaĵoj.

La evoluado de moneroj al ornamaĵo estis unuavice procezo el la romia kulturo. Dum la dua kaj la tria jarcentoj tiuj artefaktoj estis plejparte *aurei*, t.e. oraj moneroj. La ornamaĵoj probable servis kiel anstataŭiloj por juveloj kaj tiel aldonis al juveloj finanĉan kromvaloron.

Tiuj monaj juveloj tre ofte estis popularaj dum periodoj de inflacio, certe se ili havis eksterordinaran muntumon.



Necesas tamen distingi monajn juvelojn disde monformaj aŭ monecaj juveloj. La famo de altranguloj, kiel la imperiestro, ne nur estis akcentataj per la moneroj mem, sed ankaŭ per monformaj speguloj, ege ŝatataj dum la regado de Nerono. Certaj speguloj havis randojn encirkligitajn per kopioj de moneroj. Tiaj speguloj estis sendube multitaj por imiti monerojn. La reflektanta ena parto estis fabrikita surbaze de arĝentita aŭ stanita metaloj. La

muntumo estis dekorita de profundaj ornamaj sulkaĵoj kaj ofte oni vidas spurojn de la fiksado de la spegulo. Kvankam la kutimaj surskriboj sur originalaj moneroj foje estis ellasitaj sur la speguloj kaj sur aliaj monformaj objektoj, tamen okulfrapis ofte reproduktaĵoj de la noĉa rando ĉirkaŭ la busto de la eminentuloj, videblaj sur oldaj moneroj kaj medaloj.

Koncerne la monajn ornamaĵojn estas menciinde, ke la plej luksaj ornamaĵoj estis nur modeloj por malpli riĉaj posedantoj. Tion pruvas arĝentaj trovaĵoj, malpli delikate faritaj kaj kun uzo de t.n. “remburitaj” moneroj.



Daŭrigota

HISTORIAJ ASPEKTOJ

La ekua kiel pramonunuo de la Eŭropa Unio

1. Enkonduko

Je la 25a de marto 1957 la Pakto de Romo estis subskribita kiel oficiala ekigo de la Eŭropa Ekonomia Unio.

En 1987 tiu historia mejloŝtono estis rememorigita dise en Eŭropo, en Belgio per la emisio de ora monero de 50 ekuoj kaj arĝenta monero de kvin ekuoj, kiu havis oficialan kurzon en la lando. Tiu emisio – premiero kun historia signifo – estu konsiderata kiel politika agado kun simbola valoro, celante la realigon de la ideo pri eŭropa mona integriĝo.

2. La ekua monunuo

En la numismatiko ekua estas la nomo de ĉiuj moneroj el nobla metalo, kiuj estas egalaj al la francaj *écu*-oj, koncerne pezon, diametron kaj alojon.

Ekua estis la centra elemento en la Eŭropa Mona Sistemo (EMS), kiu je la 13a de marto 1979 ekfunkciis. Tiu monunuo prefere estus konsiderata kiel monunua korbo, kies definitiva kompilado konsistos el fiksa kvanto de la monunuo de ĉiu aparta membroŝtato de la Eŭropa Ekonomia Unio.

Ekua estis tuj uzata por la lanĉo de obligaciaj pruntoj en la internacia kapitalmerkato, krome por la finanĝado de diversaj komercaferoj. Tiu favora evoluo devas esti apogata per la komplezeco de la membroŝtatoj, por daŭrigi la ekonomian kaj monan integriĝon.

3. La merito de imperiestro Karlo la 5a



Tiu imperiestro naskiĝis en Gento (Belgio) en 1500 kaj en 1519 li iĝis la reĝo de la German-Romia Imperio, antaŭmodelo por la nuntempa t.n. komuna merkato, la imperio, “en kiu la suno neniam subiras”. Por stabiligi la monan politikon en 1521 la imperiestro lanĉis novan monan sistemon, i.a. per la enkonduko de la ora karoluso. Ekde 1540 sekvis arĝenta karoluso – guldeno, por kontentigi la deziron de la komercistoj, kiuj volis disponi facile manumeblajn monerojn.

4. La numismatikaj memoraĵoj el 1987

4.1 La nova ora Karlo-guldeno



Lando: Belgio
Metalo: oro (900 ‰)
Diametro: 29 mm
Diko: 2 mm
Valoro: 50 ekuoj
Jaro: 1987

Kvantoj: 1.517.000 (1987)
11.000 (1988)
Pezo: oro: 15,55 g
monero: 17,27 g
Medalistoj: Paul Huybrechts
Fernand Brose

Averso:

Busto de Karlo, surbaze de la arĝenta Karlo-guldeno (emisiita 1543-1548), farita en la tiama monfarejo de Bruĝo.

Ĉirkaŭa surskribo:

CAROLVS.D(ED).G(RATIA).ROM(ANORVM).IMP(ERATOR).HISP(ANIARVUM).REX.DVX.BVRG(VNDIAE).C(OMES).F(LANDRIAE).

(= Karlo, laŭ graco de Dio, Romia Imperiestro, Reĝo de Hispanujo, Duko de Burgundujo, Grafo de Flandrujo).

Al tiu surskribo estis aldonita lilio, la signo de la bruĝa monfarejo.

Reverso:

Indiko de la laŭleĝa valoro, 50 ECU, ĉirkaŭata de 12 steletoj, simboloj de la tiamaj 12 membroŝtatoj de la Unio, la jarindiko 1987, la lando de emisio en la tri oficialaj lingvoj de Belgio kaj la anĝelkapeto, monersigno de la Monfarejo de Bruselo.

Rimarko 1:

La belga gravuristo-medalisto Paul Huybrechts, majstrogravuristo en Herent, retuŝis la originalan gravuraĵon.

Fernand Brose, majstrogravuristo-blazonfakulo en Sassen (Theux Polleur), faris la kompiladon.

Rimarko 2:

Krome ekzistas ora variaĵo de 3,11 g, kun diametro de 16 mm. Valoro: 10 ekuoj. Eldonkvantoj: 2.000 (1989); 5.000 (1990).

4.2 La nova arĝenta Karlo-guldeno



Lando: Belgio
Metaloj: arĝento (833 ‰) + Cu (167 ‰)
Diametro: 37 mm
Diko: 3 mm (glata rando)
Valoro: 5 ekuoj
Jaro: 1987



Kvantoj: 115.000 (1987)
11.000 (1988)
Pezo: arĝento: 19,08 g
monero: 22,85 g
Medalistoj: Paul Huybrechts
Fernand Brose

Averso:

sama aspekto kiel la ora specimeno

Reverso:

indiko de la laŭleĝa valoro: 5 ECU
sama aspekto kiel la reverso de la ora specimeno

Rimarko 1:

rigardu la 1an rimarkon pri la ora specimeno.

Rimarko 2:

la kopio havas la samajn teknikajn ecojn kiel la specimeno de 1540-1548.



1543



1987

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. NI BEZONAS HELPON DE NIAJ LEGANTOJ!


XXa enigmo



Tre interesa objekto, pri kiu ĝis nun mankas ĉiuj teknikaj kaj aliaj informoj. La jarindiko 1930 sugestas, ke temas pri anakronismo, ĉar la komenco de la unua mondmilito estis samtempe la fino de la spesmila monunujo. Mirinde estas reverse la vorto “ESPERANTUJO”, ege malofta surskribo sur esperantaj numismatikaĵoj.

Mezuroj, lando, medalisto kaj historia kadro restas provizore enigmaj!

XXIa enigmo



Stampolameno, probable metala, kiu tre verŝajne datas el la epoko tuj post la komenco de la 20a jarcento; vidu la ornamaĵojn en Novarta Stilo. La kataluna Esperanto-klubo el Girona (hispane Gerona), nome “**ĜERONA ESPERO**”, kiu jam ekzistis en 1913, estis la societo kiu uzis tiun stampolamenon.

Mankas tiurilate ankaŭ la mezuroj, la historia fono kaj la medalisto!

TERMINARO

Alfabeto Listo (28)

alianca mono: moneroj kaj monbiletoj, eldonitaj de kunlaborantaj ŝtatsfederacioj aŭ tiaj landoj. Ekzemple: eŭro-mono.

bilono: malaltvalora alojo surbaze de oro aŭ arĝento kun alta elcento da alia metalo, ofte kupro. Ĝi estus oficiale uzata kiel rimedo kontraŭ hiperinflacio.

eksonumio: 1. fako, kiu studas monecajn objektojn, kiel simbolaj moneroj kaj medaloj kaj aliaj pagiloj por anstataŭigo de oficialaj moneroj. 2. Medaloj ktp, eldonitaj okaze de la remomoro de gravaj eventoj.

falsita dato: nekorekta dato (jaro) sur monero por trompi kolektantojn, plejofte por ŝajnigi la objekton pli valoran.

kanalrestaĵo: videbla restaĵo de la kanaletto, per kiu la fandita metalo eniris la matricon. .

kontaktpuro: surfaca difekto, plejofte kaŭzita de kontaktoj kun aliaj moneroj en monersakoj de monfarejoj.

monerkontrolisto: moneroficiro, kiu kontrolas monerojn kaj ties titron. Kutime dungita de la monermastro, foje de la monfarejestro.

monermastro: altrangulo en monerfarejo.

monertesto: kontrolo kaj de la pureco kaj de la pezo de moneroj.

nomindiko: identigo de monero surbaze de dato, valuto, vario ktp.

notafilio: fako, kiu studas paperajn pagilojn kaj monbiletojn.

pezadapto: fajlado antaŭ la stampado de "blanka" lameno, por atingi la ĝustan (oficialan) pezon. Spuroj de la procezo restas ofte videblaj.

rozarbetaĵo: plialtigita perlorando sur monero aŭ medalo.

senepigrafa monero: monero sen surskriboj. Tre ofte antikvaj moneroj indikas la pezon aŭ valoron nur per bildo de iu besto.

senstreĉigo: procezo de ripetitaj varmigo kaj malvarmetigo de metaloj, por malpliigi la metalstreĉitecon. Tio estas ofte farata ĉe monerlamenoj, por malrompiĝemigi la metalon antaŭ la stampado.

ŝraŭbstampilo: maŝino, kiu funkcias per ŝraŭbmovado kaj kontraŭpezoj. Tiel eblas uzi pli da forto ol per martelo, por stampi moneron aŭ medalon.

stampolameno: inversbilda metala aŭ alispeca lameno, por premi sur paperon rektan bildon de stampo.

Aliaj medaloj kaj unu plaketo de Judit Gyeney

Poeto Attila József: 1980, bronzo, Ø 10 cm



Strofo el la hungarlingva poemo “Gyermekké tettél” (Vi faris min infano) de Attila József

*Manĝigu min, vidu – mi malsatas. Kovru min – mi frostas.
Mi estas malsaĝa – okupiĝu pri mi.
Via manko penetras en min kiel trablovo en domo.
Diru, ke la timo forlasu min.*



Wolfgang Amadeus Mozart: memormedalo, unuflanka, muldita bronzo, Ø105-106 mm, 363,5 gr, sube GYJ=Gyeney Judit

Bronza plato memore al la romanisto Gereben Vas, kiu ofte ripozis sub la plurcent-jaraj kverkoj de la parko en Miklósvár.



*VAS GEREBEN 1823-1868
„ĈI LANDO HAVAS ĈION, TAMEN ONI
DEVAS TROVI ĜIN, JA EKZISTAS NENIU
LIBRO, KIU MALKOVRUS AL NI ĈI
MIRAKLAN ĜARDENON.”*



MEDALISTOJ

28. Judit Gyeney (°1942)



Judit Gyeney [djenei]: skulptisto, medalisto, pentristo kaj grafikisto, °1942, Tamási (Hungario). Divorcinta kun du filoj (unu estas cizelisto). Unu jaron ŝi studis en la Hungara Belarta Altlernejo. Sian belartan erudicion ŝi akiris aŭtodidakte kiel privata instruato de la skulptistoj Tibor Vilt kaj István Lisztes, grafikisto Gábor Gacs. Ŝi estas liberprofesia artisto. Krom tradiciaj, naturformaj skulptaĵoj ŝi kreas abstraktajn plastikaĵojn el betono, aluminio, vitro, malkovrantajn la profundon de la homa animo kaj ankaŭ kun dekoraj celoj. Individuajn ekspoziciojn ŝi havis en Tamási kaj Budapeŝto (1972), de 1978 ŝi partoprenas kolektivajn ekspoziciojn. Ŝiaj publikaj skulptaĵoj videblas en Tamási (infaneto, ŝtono; bronza busto de Ignác Gögös, 1981, malkonstruita) kaj Pári (por la falintoj de la mondmilitoj). Ŝiaj kreaĵoj troviĝas en pluraj enlandaj kaj eksterlandaj institucioj kaj en posedo de privataj kolektantoj (Novjorko, Florenco, Hungara Nacia Muzeo). Ŝi redaktas belartan revuon. Ŝi estis distingita per Landa Nivelo-premio (1984), atingis duan lokon en konkurso pri fontano en urbo Zalaegerszeg.



Rimarko 1: surskribo sube GY (=Gyeney)
medalo PRO ESPERANTO de Hungara Esperanto-Asocio

Rimarko 2:

en ENA-revuo jk. 2 n-ro 4 ni erare menciis alian medaliston (Tibor Csiky) por klarigi la inicialojn GY. Bonvolu kompari kaj relegi la priskribon!

Ni tutkore dankas nian provleganton Jozefo Horvath, kiu havigis al ni ne nur la biografiajn informojn, sed ankaŭ la bonkvalitajn ilustraĵojn.

NUMISMATIKA FORUMO

Kriptomono Esperanto (2)

Christian Kameir



Avantaĝoj de ciferecaj portiloj

Blokaj bazitaj aktivaĵoj – inkluzive de bitmono – povas esti plenigitaj de aldonaj funkcioj per inteligentaj kontraktoj, kreante formon de "programebla mono." Kiel iliaj real-mondaj kolegoj, ĉi tiuj ciferecaj portiloj ne postulas uzantojn, por inkludi triajn en la interŝanĝo. Kiel dokumentis multaj blokaj esploristoj, la blokĉeno, per sia sendependa reto de ministoj, konfirmas ajnan transakcion inter partioj ene de 10 minutoj kun nominala kotizo. Kaj, male al bankaj transakcioj, kiuj povas daŭri tagojn kaj kelkfoje semajnojn por plenumi, novaj enskriboj en blokĉeno estas finaj, kaj la ricevanto rajtas uzi la monon tuj.

Butiko de valoro

Mallonga ekrigardo al la statistikoj pri inflacio de la mondo, eldonita de la Internacia Mona Fonduso, rapide malrekomendas la ideon, ke registara mono donas stabilan valoran butikon. Kaj, kvankam plej multaj nacioj ĝis nun eskapis de la niveloj de hiperinflaciaj landoj kiel Venezuelo (10.000.000%), Zimbabvo (73%) kaj Sudano (50%), historie moneroj ne daŭris pli ol 25 jarojn.

Portilinstrumentoj, lanĉitaj de federaciaj monfarejoj, kiel ekzemple pencoj, ŝilingoj kaj estejo, aĉetis ĉiutagajn produktojn kaj servojn (la ĉiutaga Times estis vendita kontraŭ unu penco en 1900). Hodiaŭ ĉi tiuj instrumentoj plejparte perdis sian utilecon. Eĉ se plej multaj usonaj

moneroj hodiaŭ fariĝis nepraktikaj por aĉetoj, kaj pluraj moneroj estas produktataj koste de pli alta ol nominala valoro, moneroj estas kreitaj koste al impostpagantoj, kiuj pli bone kolektus ĉi tiujn pro ties metala valoro.

Kriptaj moneroj

La termino "kripta monero" plej bone priskribas malgrandan subaron de blokĉen-derivitaj aktivaĵoj precize. Kaj eĉ moneroj kaj signoj, kreitaj por la specifa celo funkcii kiel valutoj, trovis malmultan konsumadon. Kelkaj projektoj elektis nepermanentecon kiel la ĉefan problemon. Ĉi tio kondukis al la kreo de nova kategorio de kriptaj moneroj, nomata "stabilaj moneroj." La plej rimarkindaj partoprenantoj en ĉi tiu kreskanta kategorio ĝis nun kun merkata kapitaligo laŭ CoinMarketCap de \$ 3.4 miliardoj kaj \$ 343 milionoj ĝis la 16-a de junio 2019, estas Tether kaj USD Coin. Ĉi tiuj ĵetonoj estas ligitaj al la usona dolaro, kun la celo konservi unu-al-unu korelacion (do eble estus pli ĝuste nomi ĉi tiujn ĵetonojn *USD Pegs*). Kvankam eble estos tro frue por juĝi, ĉu stabilaj moneroj pliigos konsumadon, ŝajnas dubinde, ke ĉi tiuj instrumentoj povas defii fidajn oficantojn sur sia hejma teritorio, kondiĉe ke konsumantoj devas konverti monon fidatan al la nova rimedo.

Unueco de konto-mono kiel lingvo

Interŝanĝoj kaj monuoj de kripta monero tra diversaj landoj montras subtilajn, kvankam signifajn diferencojn, kiam ili montras aktivaĵojn bazitajn sur blokĉenoj. Eĉ se plej multaj aplikoj povas servi defaŭlte al la angla kiel *lingua franca*, uzantoj eble vidas konvertiĝon de siaj ciferecaj posedaĵoj al sia loka jura pagilo. Kiel tia, "mono" povus ankaŭ esti pensata kiel "komerca aŭ valora lingvo" de individuo. Se ĝi prezentas numeron antaŭfiksitan per simbolo, kiu ne estas parto de la ĉiutaga popola lingvo de homo, oni estas devigita traduki ĝian valoron en la konatan valoron. Kvankam ĵetonoj, ligitaj al fidata mono, eble ne postulos tradukon, estas malmultaj kontraŭpartioj ĝis nun pretaj akcepti ĉi tiujn "stabilajn monerojn".

Historie, civitanoj sin turnis al alternativoj de dekretaj moneroj, kiam la aĉetpovo de sia registara kreita pagmaniero draste malfortiĝis pro inflacio. Dum krudvaroj kiel oro daŭre estas populara elekto por konservado de riĉeco, ĉi tiuj ne donas multan utilecon por ĉiutagaj elspezoj. Anstataŭe, konsumantoj ofte sin turnis al portaj instrumentoj, eldonitaj de aliaj naciŝtatoj. En iuj kazoj, lando eble eĉ iros al la drasta rimedo forlasi sian suverenan valuton favore al la mono de alia lando – kiel okazas en Ekvadoro, Orienta Timoro, Salvadoro, Marŝala Insularo, Mikronezio, Palaŭo, Turkoj kaj Kajkoj, britaj Virgulininsuloj kaj Zimbabvo; ĉiuj menciitaj landoj listigas la usonan dolaron kiel oficialan valuton hodiaŭ.

Dum la tutmonda ciferecigo de valutoj ŝajne kreis egalajn kondiĉojn por la monda fidinda mono, konsumantoj hezitas adopti novan komercan lingvon. Kiam loka valuto montras fortajn

signojn de malsukceso, civitanoj plej ofte sin turnas al ŝajne ĉiea formo de kontantmono kiel ekzemple Usonaj Federaciaj Rezervaj Biletaj.

Konkludoj

Mono kaj valutoj klare diverĝis, la unua devas esti simple komprenata kiel lingvo, kun la duaj efektivigitaj kiel pura / senfrikcia teknologio. Estas sufiĉe da pruvoj nun, ke kriptaj moneroj daŭre malsukcesos, por kompletigi fidatajn monerojn en signifa maniero kiel "mono" – simile al la malsukcesa aliro de enkonduko de artefarita mondlingvo (Esperanto). Dum stabilaj moneroj povus ludi malgrandan peran rolon survoje al solvo, sukcesa arkitekturo bazita en blokĉenoj devas efektivigi valuton kiel protokolon per konsumantaj programoj, kiuj provizas senjuntan ponton al heredaj *fiat*-teknologioj. Same kiel la voĉa interreta protokolo (alinome, voĉa IP aŭ VoIP) rajtigis Skype defii telefonajn telefonistojn tutmonde, ĉi tiu fina paŝo – kiu legitime difinas "mono-super IP" – redefinos monon.

Simile al skribitaj leteroj kaj poŝtmarkoj, cedantaj al retpoŝtaj mesaĝoj, heredaj monaj sistemoj kaj iliaj propagandantoj povus esti forigitaj al la obskura angulo de teknologio kun rotaciaj telefonoj kaj sendantoj. La solvoj al la koincido de problemoj pri bezonoj probable troviĝas en klientaj aplikoj, kiuj pelas la uzon de perantoj kaj laŭleĝa pagilo al la franĝoj, konvertante faktajn butikojn de valoro al *fiat* nur kiam necesas kiel mallongdaŭra interŝanĝa mekanismo al limigitaj heredaĵaj sistemoj, al akcepto de inflaciaj ŝuldaj instrumentoj.

Christian Kameir

Christian Kameir estas administra/mastruma partnero ĉe la riskokapitala fonduso Sustany Capital.



EL LA GAZETARO

1/18 Nova Urbo – Februaro 2018

12/03/2018

Esperanto-monoj


kaj esperantaj monNomoj

Komence ni klarigu, ke ĉi tiu vortluda titolo ne estas ŝerco – vere ekzistis monoj kiujn elpensis esperantistoj! Eble tio estas paradokso, ĉar financoj neniam estis forta flanko de nia movado. Sekvas tri ekzemploj. La plej aktuala: **1.** Onidire, belga esperantisto Germain Pirlot elpensis la nomon “**eŭro**” por la nuntempa eŭropa mono. **2.** Krom la sube menciita spesmilo, ekzistis ankaŭ E-monunuoj nomita “**stelo**” sed por tio necesus verki apartan artikolon. (Ni ricevis la informon, ke estas eldonita arĝenta 100-stela monero okaze de la 150-a naskiĝa datreveno de René Saussure). **3.** La tria estas “**spesmilo**” pri kiu vi legos ĉi sube.

S



Antaŭ 150 jaroj naskiĝis svisa matematikisto **René de Saussure**, kiu en 1907 proponis adopti internacian monunuon kaj nomis ĝin per E-vorto “spesmilo”. La nomo estis ne nur bela, sed logika ĉar unu spesmilo havis mil *spesojn* kaj egalas al du britaj ŝilingoj (= al unu usona dolaro aŭ unu rusa rublo). Ekde la komenco, spesmilojn uzis Ĉekbanko Esperantista **Ĉ.E.** en Londono kaj unu spesmilo havis valoron de 2 ŝilingoj.



Humura poŝtkarto pri la kreinto de spesmilo.

Pri Saussure tiel skribis la princo de E-poetoj, K.Kalocsay en siaj “Rimportretoj”:

Saussure – la pura, klara Mens’,

La projektinto, projektonto,

Trabrilis, kvazaŭ lumofonto

La vortstrukturon lia Lens’.

Transpagoj per spesmilo estis oportunaj kaj kostis tre malmulte. Tial ĝi estis uzata en 320 urboj de 43 landoj. Ĉ.E. estis fondita de industriisto H. F. Höveler kaj funkciis sep jarojn, ĝis la unua mondmilito (-1914). Samjare kiam aperis “spesmilo” – Saussure komencis redaktadon de “Internacia Scienca Revuo”. Li okupiĝis ankaŭ pri **esperantologio kaj interlingvistiko**; lia plej grava verko titoliĝas “Pri la vortfarado de Esperanto”. En majo 1913, Saussure formulis la gravan principon de *Neceso kaj Sufiĉo*. René Saussure mortis antaŭ 75 jaroj en Berno.

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

07.10.2021 16:12

Kara Jozefo,

Ne kredeble! ENA jam aktivas dum preskaŭ ok jaroj kaj prezentos en oktobro la kvaran numeron de la oka jarkolekto de la revuo.

Dum tiu longa periodo vi efike kaj profesie kontrolis la artikolojn, ortografie, gramatike, ktp. Dank'al vi ni neniam devis honti. Legantoj eĉ informis min, ke ili regule legas viajn rekomendojn kaj rimarkojn pri lingvaj problemoj.

Sendube via laboro restos fruktodona, do mi denove afable petas vin provlegi la artikolojn de la nova numero.

Mi anticipu kaj tutkore antaŭdankas vin. Krome korajn salutojn al vi kaj al viaj gekaruloj!

Amike kaj danke,

Bert

11.10.2021 17:54

Kara Bert,

antaŭ ĉio mi ĝojas pri via mesaĝo, kiu atestas, ke la murda morbo ne trafis vin. Pluajn senkovimajn jarojn mi deziras al vi kaj al viaj geamatoj.

Jen sube kelkaj miaj rimarkoj:

abonant(in)o: *abonanto* estas neŭtrala formo por ambaŭ genroj, do superfluas troindiki per *abonant(in)o*.

filiĉo: *filo* estas vorto per si mem virgenra, do aldoni *-iĉ-* estas pleonasmo. Krome ĉi tiu nun moda sufikso renversas la gramatikan sistemon de Eo, ja vortoj kiel *instruisto*, *bovo*, *helpanto* ks. estas konvencie unuflanke genre neŭtralaj, aliflanke virgenraj.

brasaĝo: ĉu bezonatas aparta nomo por la salajro de monfarejestroj? Ĉu *brasaĝo* (erarige memoriganta pri la franca teĥnika termino *brasage*) estas aparta nomo por speciala salajro?

bronzoputro: kiel figura esprimo eble taŭga, kvankam origine biologica kaj figurasence iom beletra. Ĉu ne pli taŭgus *bronzopatino*?

origi: sufiĉas laŭ PIV kaj ankaŭ laŭ mi *ori* (kiel ekz. elsubstantivaj verboj *bronzi*, *kupri*, *sali*, *sapi*).

prapramono: sufiĉas *pramono*.

imperiestro Francisko Jozefo la 1a: estis nur unu imperiestro kun tia nomo, do nur imperiestro Francisko Jozefo.

Gratulon pro la interesa kompilo, kiu plivervigas eĉ korojn ne-numismatajn!

Amike: Jozefo

26.10.2021 22:47

Kara amiko Jozefo!

Hodiaŭ mi havas specialan peton.

La hungara artistino Judit Gyeney (°1942) kreis almenaŭ unu belegan Esperanto-medalon (jam priskribitan en nia revuo); do laŭ mi ŝi meritas certe lokon en nia panteono de medalistoj. Bedaŭrinde, krom foto en la Reto, mi apenaŭ trovas informojn pri ŝiaj edukado kaj artista kariero.

Eble – espereble- vi trovos por mi nekonatajn fontojn por prilumi ŝian vivon kiel virino kaj artistino.

Ne urĝas, certe ne, sed mi jam kore antaŭdankas vin pro via venonta esplorado!

Amike kaj numismate,

Bert



13.10.2021 16:31

Multajn dankojn.

Mi miras, ke vi povas trovi ĉiam novan skribindaĵojn.

Amike

Adri

14.10.2021 17:31

Kara Adri!

Ne dankinde! Mi danku vin pro via afabla reago...

Numismatiko havas tiom da aspektoj, ke ne malfacilas trovi temojn diversspecajn!

Amike kaj numismate,

Bert



13.10.2021 17:02

Saluton,

Dankon pro la interesa revuo.

Mi supozas ke la medalo de la Esperanto-tenis-turniro 1912 ne originas el Britio, sed el germanlingva lando:

"II. ESPERANTO – TENNIS – TOURNIER" supozeble signifas "2-a Esperanto-tenis-turniro": en la germana oni ja ofte uzas punkton post cifero por indiki ordan numeralon (komparu ankaŭ la daton "29. SEPT. 1912"), kaj "Tournier" estas variaĵo de la germana "Turnier";

"I.PREIS" sendube signifas "1-a premio";

la vorto "Klasse" klare estas germana.

Kun koraj salutoj,

André Ruysschaert

14.10.2021 14:11

Kara André!

Ne dankinde!

Mi mem danku vin pro viaj rimarkoj kaj korektoj rilate al la tenismedalo. Nia Walter Klag el Vieno konfirmas kion vi klarigis. Do mi repriskribos la medalon en venonta numero!

Amike kaj samideane,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

13.10.2021 17:25

Saluton,

Vi menciis "25 asociaj membroj"n, ŝajnas al mi ke la Internacia Esperanto-Arkivo ankoraŭ ne troviĝas inter ili, kvankam ĝi bonvenigas de ĉiuj revueldonantojn ekzempleron por eterna konservado. Ĉu vi povas aldoni IEA'n kiel estante asocia membro?

Amike,

Marc

14.10.2021 14:06

Saluton!

Multan kaj koran dankon, ke vi proponas aldoni IEA-n kiel 24an asocian membron! Al kiu retadreso mi sendu ekzempleron? Tiel mi povus aldoni ĝin al la asocia listo.

Amike,

Bert



13.10.2021 17:23

Kara Walter!

Unuavice multan dankon pro via pozitiva reago.

Mi ankaŭ havas peton. Mi kunsendas reagon de belga samideano pri la tenis-turnira medalo en la nova numero. Bonvolu legi ĝin kaj mem komenti la rimarkojn, kiuj eble estas korektaj.

Multan antaŭdankon,

Bert

Saluton,

Dankon pro la interesa revuo.

Mi supozas ke la medalo de la Esperanto-tenis-turniro 1912 ne originas el Britio, sed el germanlingva lando:

"II. ESPERANTO – TENNIS – TOURNIER" supozeble signifas "2-a Esperanto-tenis-turniro": en la germana oni ja ofte uzas punkton post cifero por indiki ordan numeralon (komparu ankaŭ la daton "29. SEPT. 1912"), kaj "Tournier" estas variaĵo de la germana "Turnier";

"I.PREIS" sendube signifas "1-a premio";

la vorto "Klasse" klare estas germana.

Kun koraj salutoj,

André Ruyschaert

13.10.2021 17:59

Kara Bert!

La uzo de romiaj ciferoj en Germanio ne plu estas uzataj.

ekzemple: I. Preis = 1. Preis = 1-a premio = 1a premio.

En mia germana Vortaro mi trovis: Tour, Tournee, sed Turnier.

La vorto Turnier devenas de la mezepoka altgermana turnieren (partopreni duelon post la surĉevala volteo). Pli oldaj fontoj estas la latina tornare kaj la prafranca tornier.

Fonto: Kluge - Etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache.

Ĉu taŭga respondo?

Korajn salutojn,

Walter

13.10.2021 18:23

Dankon, kara amiko!

Viaj klarigoj konfirmas la korektojn kaj aldonojn de samideano Ruyschaert. Nur "Tournier" restas iom enigma. Eble rolis la influo de la franca (tiam ankoraŭ "lingua franca" en Eŭropo!).

Amikajn salutojn al la tuta familio!

Bert

13.10.2021 18:53

Lieber Bert!

Im Fremd= und Verdeutschungs=Wörterbuch 1910, in neuer Rechtschreibung (en frakturo) mi trovis:

tourneren (frz.): (Gemüse) drehen, (Obst) abdrehen, ein Kartenblatt als Trumpf aufschlagen.

Turnier (a. d. Frz.): Ritterliches Kampfspiel.

turnieren = mit dem Rosse wenden; ein Turnier veranstalten.

Herzliche Grüße!

Walter

26.11.2021 10:50

Esperanto-Steloj serio vendita en aŭkcio

Kara Bert!

Hieraŭ (2021 11 25) vendiĝis unu serio de Esperanto-Steloj en aŭkcio de la renoma aŭkciejo Dorotheum en Vieno.

Mi sendas al vi du fotojn:

1... Du paĝoj el la katalogo de tiu aŭkcio;

<https://katalog.dorotheum.com/books/gtcq/#p=22>

2... Foto kun la aŭkciisto.

Salutas Walter



26.11.2021 11:47

Gratulojn al vi Walter, en la nomo de ENA kaj en mia propra nomo!

Amike kaj numismate,

Bert



13.10.2021 20:06

Saluton Bert

Dankon pro la nova revuo!

Mi jam aldonis ĝin al la kolekto en Vikiflandrio.

https://vikiflandrio.alcl.be/_bezoek/_dokumentaro/bron_rena_pdf.php

PS. Mi ĵus vidis ke mi ĝis nun ne ricevis iun ajn reagon al mia respondo pri la aldono de aktivaj enhavtabeloj en viaj revuoj.

Vi tiam demandis al mi: “Kiel mi povus aktivigi la enhavotabelojn? Mi ne estas fakulo!”, do mi klopodis klarigi tion sed eble ĝi ne funkcias per via programo?

(La menciita mesaĝo estas aldonita ĉi sube)

Kun afablaj salutoj,

Albert

14.10.2021 14:23

Saluton, kara Albert!

Ne dankinde. Mi mem danku vin pro la aldono de la nova numero al Vikiflandrio.

Pri via propono koncerne la aktivigadon de la enhavotabeloj mi intencis peti helpon de mia filo kiam li vizitus min en Tienen. (Li loĝas en Gent). Antaŭ kelkaj monatoj li ricevis malbonan mesaĝon pri sia sano (kancero) kaj ekde tiam ni devas eviti kontakton, krome pro la korona viruso.

Do, mi devis provizore flankenmeti vian proponon, ĉar mi mem ne estas fakulo pri komputila strategio....

Amike kaj numismate,

Bert

14.10.2021 19:38

Saluton Bert

Ege malĝojigas min la novaĵo pri la sanstato de via filo. Espereble li baldaŭ povas resaniĝi.

Mi nur demandis vin pri la tekstproblemo, ĉar mi timis ke tiu parto de mia mesaĝo eble perdiĝis.

Kiam vi estas preta aŭ bezonas mian helpon, bonvolu sciigu min.

Kun afablaj salutoj,

Albert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

13.10.2021 20:11

Ne plu ekzistas taŭgaj vortoj en mia parkerigita vortareto, por inde esprimi kion mi pensas pri via ENA!

Ĝi estas mirinde interese, informvalorega, unika entute: gratulegojn al vi kaj gratulegojn pro via brila iniciatemo. Daŭran sukceson mi deziras al vi!

Amike, Elda

PS: mi nur ĝin trafolumis, metis ĝin en arkivo kaj iom post iom ĉion mi ellegos: estu certa!



13.10.2021 20:55

Multan dankon al Vi, tre kara amiko Bert Boon, pro sendo de via belega kaj interesa kvara numero de la oka jarkolekto de via revuo kun simpatiaj bondeziroj.

Kiel danko ni ŝatus inviti Vin spekti belegan komponaĵon de la muzikkomponisto Paiva Netto titolitan **Jesuo, Via Amo estas nia amado**. Ĝi estas interpretita portugallingve, --- kun subtekstoj en Esperanto---, de la Granda Orkestro de Sofio, Bulgario.

Jen la ligilo:

https://www.youtube.com/watch?v=_swyJGpdHCA

Ĉion plej bonan al Vi!

Plej amike kaj frate,

samlingvane,

Maria Aparecida da Silva



14.10.2021 10:20

Dankon!

Mi dissendos revuon al esperantistoj kaj legantoj de Esperanto Libraro.

Amike,

Maria Niemyjska

14.10.2021 13:50

Kara Maria!

Ne dankinde. Mi danku vin!

Ĉu vi jam legis la redakcian artikolon sub la rubriko "De ni...por ni!"?

Antaŭdankon ankaŭ, ke vi denove intencas dissendi nian revuon al esperantistoj kaj legantoj de Esperanto Libraro.

Post la antaŭa dissendo, mi tamen ne ricevis reagon, eble ĉar nia varbilo troviĝas sur la lasta paĝo. Tial mi petas vin dissendi ankaŭ, se eble, la tekston kiun mi nun aldonas.

Multan dankon, kara amikino!

Amike,

Bert



24.10.2021 19:13

Estimata Bert

Mi ricevis revuon Esperanta Numismatiko 4/2021. La revuo estas tre interesa kaj vere surprizis min. Mi kiel esperantisto kompreneble kolektas E-medalojn, monerojn kaj insignojn.

Mi redaktas polan dumonatan revuon "Pola Esperantisto". Mi volus prezenti (kun via akcepto) la revuon en PE. Mi havas novan ideon por nia revuo - krei angulon/ĉapitron "E-revuojn" por prezenti en ĝi heredaĵon de E-kulturo kaj E-movado. Danke al via revuo mi kuraĝos komenci tiun ideon. Ĉu mi povas uzi varban tekston de lasta paĝo?

Kun amikaj salutoj

Robert Kamiński, Łódź (Lodzo), Pollando

24.10.2021 19:23

Estimata Robert!

Vi kompreneble rajtas realigi viajn ideojn kaj mi certe kunlaboros kun vi. Do prezentu ENA-n kaj ĝian revuon en PE per publikigo de nia varbilo!

Ĉu vi mem volas aliĝi kiel 149a membro kaj ricevi la venontajn numerojn direkte al via retadreso? Tute senpage!

Amike kaj numismate,

Bert



25.10.2021 11:59

Kara Bert,

Mi bone ricevis la lastan belan kaj interesan bultenon de ENA.

Mi ne havas multe da tempo por dediĉi al mia pasio de juneco Numismatiko, sed mi volis informi vin ke antaŭ monatojmi hazarde akiris monerojn en esperanto: 2 specimenojn de Banco de Cabinda 2017.

Mi ne havis tempon rigardi ĉu jam estis io pri tio en lastaj ENA-bultenoj.

(ŝajnas ke ili faris du diversajn monerojn pri Esperanto)

Kun amikaj salutoj

Michel Basso

25.10.2021 20:11

Kara Michel,

Mi tute ne dubas pri via manko da tempo, sed viaj akiro kaj intereso koncerne la objektojn el Cabinda pruvas, ke vi tamen havigas al vi tempon por reagi je la ricevo de nia nova revua numero. Multan dankon al vi!

Nu, ankaŭ mi aldonis tiujn "monerojn" al mia kolekto kaj jam priskribis kaj klarigis ilin en la tria numero de 2020 sur paĝoj 10 kaj 11. Agrablan legadon!

*Permesu, ke mi montras min iom scivoleman pri la esperantaj moneroj kaj medaloj **en via kolekto**. Eble vi havas ion kion mi tute ne konas kaj povus priskribi en venonta numero...! Eble vi havos por mi surprizon en via numismatika listo!*

Amike kaj numismate,

Bert



26.10.2021 15:41

Saluton Alfred, kara kaj fidela ENA-membro!

Tute hazarde mi relegis artikolon en la sesa numero 2008(!) de "ESPERANTO Aktuell". Sur paĝoj 10-11 mi remalkovris artikolon, esperantigita de Mag. Helga Farukuye, sub la titolo "La monreformo de Wörgl 1932/33". Tiu artikolo laŭ mi ege taŭgus por nia rubriko "Historiaj aspektoj" (de numismatiko) de nia ENA-revuo.

Jen do kial mi petas al vi, tiama redaktisto, la permeson kopii ĝin por nia "Esperanta Numismatiko".

Sendepende de via decido, mi antaŭdankas vin kore.

Amike kaj numismate,

Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

26.10.2021 16:21

Kara Bert,

mi dankas pro via intereso.

Certe mi permesas al vi uzi la artikolon.

Mi bone memoras la artikolon, ĉar mi estis en Wörgl dum kunveno de aŭstria Eo-Asocio.

Ĝis

Alfred

26.10.2021 16:34

... mi trovis kelkajn fotojn rilate al la artikolo. Eble vi povas uzi ilin.

Alfred

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

12.11.2021 11:48

Kara James,

Mi esperas ke vi kaj via familio ankoraŭ fartas bone, kiel ni.

Mi bezonas vian helpon por priskribi du brazilajn medalojn. Mankas al mi veraj fotoj de ambaŭ flankoj, pri mezuraj informoj kaj historieto.

Mi aldonas skanon de tiuj medaloj desegnitaj de nia karmemora Hans Jankowski.

Mi esperas, ke tio ne kostos al vi tro da tempo. Mi tamen supozas ke vi konas personojn kiuj posedas tiun informojn.

Ĉiel, la tuta afero ne vere urĝas.

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

12.11.2021 11:58

Kara samidean(in)o,

Kiel asocian membron de ENA mi petas vin, se eble helpi min trovi bonkvalitajn fotojn de la du medaloj aldone, el broŝuro de nia kormemora Hans Jankowski, kiu desegnis la medalojn. Sekve mi ankaŭ bezonus mezurajn kaj historietajn informojn kaj detalojn.

Ne vere urĝas, sed mi antaŭdankas vin kore.

Amike kaj numismate,

*Mag. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*



☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.11.2021 10:54

Kara ENA-membro Mariana,

Saluton! Mi esperas, ke vi regule ricevas nian revuon kaj ke ĝi plaĉas al vi.

Por nia nova rubiko "Esperantaj stampiloj", mi sukcesis aĉeti bulgaran stampilon kun stampo pri la Dua Internacia Kino-foto Festivalo kiu okazis en Vraca de la 10-15 X 1988.



*En la Jarlibro de UEA mi trovis informojn pri deligito Vanja Ĵeljzkova Koleva, historiisto kun telefonnumero (092)629048 kaj poŝtadreso bul. Demokracija 6, vh. 2 ap.16, 3000 Vraca. **Bedaŭrinde tiu persono ne havas retadreson, mi supozas (?).***

Sed, eble vi mem povus havigi al mi sufiĉe da informoj pri tiu festivalo por kompili artikolon por nia revuo "Esperanta Numismatiko". Ĉu?

Mi antaŭdankas vin tutkore pro via helpo.

Amike kaj numismate,

*Mag. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*

15.11.2021 12:03

Saluton, kara Bert,

bedaŭrinde mi mem nenion scias pri tiu ĉi festivalo. Mi petis sendadi al mi la bulteno, ĉar mi deziras esti informata kaj plu informi al bulgaraj geesperantistoj, multaj el kiuj tute ne uzas interreto. Sed mi mem ne estas pasia kaj sperta kolektanto.

Mi provos demandi al s-ino Ĵeljazkova. Mi ne sukcesis alvoki ŝin - eble la telefonnumero ŝanĝiĝis aŭ temas pri oficeja telefonnumero, kiu nun ne funkcias pro la pandemio. Mi supozas, ke du aliaj personoj eble ankaŭ scias pri la festivalo.

Sed mi havos terure streĉan semajnon kaj antaŭ la semajnfino ne havos tempon por telefonadi kaj demandadi. Bv. memoriĝi al mi vendrede, kaj semajnfine mi faros. Ankaŭ mi povas demandi en la bulgara Facebook-grupo.

Amike,

Mariana Evlogieva



27.11.2021 10:41

Estimata redaktoro,

Mi tutkore gratulas edukado.net okaze de la 20-jara jubileo.

Kiel iniciatinto de ENA kaj redaktoro de "Esperanta Numismatiko" mi estas scivola ĉu via asocio nepran tiurilatan memormedalon eldonos. Ni preparadas la unuan Katalogon de Esperanta Numismatiko kaj ĉiun numismatikaĵon en ĝi ni entuziasme bonvenigas.

Amike kaj numismate,

Bert Boon

28.11.2021 1:38

Dankon pro la gratuloj.

Bedaŭrinde ni neniun memormedalon planas eldoni okaze de la jubileo. Ĉio kostus monon kaj tio estas kion ni devas ŝpari pro la rekonstruo.

Amike salutas vin,

Katalin Kovats



ANONCOJ

&

EVENTOJ

Dorotheum aŭkcio Steloj 2021 11 25 Ekde la 10a horo.

a) El la presita katalogo: <https://katalog.dorotheum.com/books/gtcq/#p=1>

The image shows a screenshot of the Dorotheum auction catalog. It features several pages of listings for coins and medals. The listings include images of the items, their identification numbers (e.g., 1309, 1310, 1311, 1312), and detailed descriptions in German. The descriptions provide information about the item's origin, material, and weight. Prices are listed in Euros (€). The catalog is organized into sections, with some items grouped together. The page number 204 is visible at the bottom of the page.

b) Jen la du ligiloj:

<https://www.dorotheum.com/de/1/7388275/>

<https://www.dorotheum.com/de/1/7388278/>

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ok jaroj ĝis 150 individuaj membroj kaj 24 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be